1-a Jaro, N-o 30

APERAS S.A.T. SEMAJNE

23. Aprilo 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Gvidanto: E. LANTY
24, Boulevard Beaumarchais, Paris XI.

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Perspektivo postmondmilita

Antaŭ la lasta milito de la Antanto kontraŭ la Centraj Potencoj, Anglio estis la plej alta lando, laŭ vidpunkto de industria evoluado. Ĝi nur havis unu konkuranton kiu laŭŝajne estus gajninta tiun pozicion. Okazis la milito, kaj Germanio estis venkita. Oni parolus penpripense, se oni dirus ke Anglio estus konservanta sian antaŭan monopolecon kiel ĉefa industria lando. Dum la militjaroj evoluis eksterordinare rapide du aliaj landoj, Japanio kaj Usono, kiuj nun okupas kiel konkurantoj la antaŭan pozicion de Germanio rilate al Anglio.

Post la milito ni nun troviĝas en tiu situacio, ke Germanio estas sklavigita lando sub la ekspluat-kontrolo de Eŭropo-Ameriko, kaj plie — ke tuta Eŭropo estas sklavo de la plej alta potenco — Usono. Anglio nun devas konkuri kontraŭ Usono.

La ŝanĝo en la mondgraveco de ambaŭ landoj montriĝas precipe en ciferoj pri koton-ŝpinado kaj posedo de ŝipoj.

Ŝpinilojn havis	1912	1922	
Britio	55,1	56,6	milionojn
Usono	29,5	36,9	„

Ŝipojn havis	1913	1923	
Britio	18,8	19	milion. tunojn
Usono	1,8	12,4	„ „

Post la milito Japanio enŝovis sin inter la rangoj de la ĉefaj nacioj kaj pretendis sian rajton esti traktata kiel moderna lando. Ĝia rapida evoluo montriĝas en jenaj ciferoj:

Ŝpinilojn havis	1912	1922	
Japanio	2,1	4,6	milionojn
Ĉinio	0,9	2,2	„ „

Antaŭ la milito Japanio kutimis importi siajn kotonprovizojn de okcidentaj landoj kiel Anglio, sed nun — post la milito — ĝi akiris tiom da novaj maŝinoj ke ĝi ĉesis esti granda merkato kiel antaŭe por tiuj ĉi aĵoj. Ĝi mem produktas ilin kaj sendube post kelkaj pluaj jaroj eniros la mondkomercon kiel plensignifa konkuranto kontraŭ la aliaj okcidentaj potencoj. Same okazis pri aliaj orientaj landoj. Tiu evoluo reflektiĝas en la komercado de Anglio, laŭ jenaj ciferoj:

De Anglio estis eksportitaj kotonaĵoj

al	1913	1921	1922	1923
Turkio	360	56	67	85
Ĉinio	716	211	309	234
Japanio	50	13	21	16
Brita Hindio	3057	1092	1403	1411

milionaj kvadrataj jardoj (= 36 coloj)

La problemo nun prezentiĝas al la kapitalistoj en la klara formo: Kiel trovi novajn merkatojn por disponi pri la komercaĵoj propraj? — La konkurantoj ŝvelas laŭnombre, kaj la merkatoj fermiĝas.

Tiu malfacileco ne povas solviĝi sub kapitalista mondregado.

Kvankam Japanio estas insulo kiel Anglio, tamen ĝia prosperkapablo renkontis gravan malhelpaĵon. En Anglio la ĉefaj mineraloj, fero kaj karbo, estas tre proksimaj unu al alia, kaj tiu fakto permesis ĝian stariĝon kiel unuaranga potenco. Sed tiuj ĉi mineraloj tute mankas en Japanio. En tiu lando troviĝas la maŝinaro, sed mankas la krudmaterialoj.

Tiu manko en la ekonomia sfero direktas la politikon de Japanio iri eksteren por akiri landojn kiuj entenas la mankantajn mineralojn. Kaj tia lando troviĝas en proksima apudeco kaj ankaŭ ne estas forprenita jam de alia potenco. Estas Ĉinio. En tiu lando troviĝas fero kaj karbo, precipe en Manĝurio. Laŭ parolo de S-ro Inone (gubernanto de la Banko de Japanio) 1921, “la demando estas grava, ĉar japana loĝantaro kreskas je sesĝis sepcent miloj ĉiujare, ĝi posedas kvar milionojn da ŝpiniloj, sed nenian kotonon, teksas 34 milionojn da jardoj da lano ĉiujare, sed posedas neniajn ŝafojn, kaj konsumas 1 1/2 milion-tunojn da ŝtalo ĉiujare, sed posedas neniajn krudaĵojn. Konsekvence devas esti diferenco inter la ekonomiaj agoj de Japanio kaj tiu de aliaj nacioj en Ĉinio, — sed la situacio estus tuj komprenata de ĉiuj potencoj.“

La Sud-Manĝuria Fervoja Kompanio estas la ĉefa bazo por Japania agado en Manĝurio. Ĝi estas potenca kompanio, el kies kapitalo granda parto estas posedata de la japana registaro. Tiu ĉi kompanio fondita en 1906, estas multe pli ol nura fervoja kompanio: ĝi kontrolas hotelojn, gasejojn, akvejojn, ferlaborejojn, karbominejojn, tramvojojn, elektrafortstaciojn, ŝipliniojn ktp., ankaŭ lernejojn, hospitalojn kaj farmojn en la fervoja ĉirkaŭaĵo.

Kiel antaŭe menciite, Germanio estas sklavo de la mondkapitalistoj, kiuj plejparte troviĝas en Usono. Kion fari kun la riparproduktaĵo de Germanio, tio kaŭzas kapdoloron al la Usonaj potenculoj. En la tuta mondo ne troviĝas merkato, kiu povas sorbi tiun amason da komercaĵoj postulitaj de la Dawes-raporto.

Peni reformi la faletantan kapitalismon estas por la laboristoj malŝparo de tempo. La reformproponoj rekonstruas nenion,

sed nur plilongigas la por la popoloj suferigan sistemon.

Nur unu solvo videbliĝas: ke socialismo stariĝu en la mondo pere de kompleta tutmonda revolucio.

SAT-ano 3398 (Londono).

K. RADEK

Gvidanto de Ĉina Popolo[1])

(Fino)

Por Sun-Jat-Sen komenciĝas novaj jaroj de elmigrado, novaj jaroj de suferoj kaj meditadoj. Venas la mondmilito. Japanaj armeoj "liberigas" Ĉinion de germanoj, sed nur por prepari, firme eksidiĝinte en Ŝantung, konkiron de la tuta Ĉinio. La grandaj rabistoj ekdronis sur la batalkampoj de Eŭropo; Usono ĵus konstruas grandan ŝiparon kaj armeon kaj ne povas rezisti al aspiroj de Japanio; en la kontrakto inter la amerika ministro por eksteraj aferoj Landzig kaj japana ambasadoro Iŝi — Usono agnoskas apartajn interesojn de Japanio en Ĉinio. Japanio mortkaptas Ĉinion, penas elŝiri de ĝi 21 kondiĉojn, kiuj en esenco signifas plenan jugon por ĉina popolo. Ĉinio serĉas la savon en tio, ke ĝi deklaras militon al Germanio. Ĝi, kompreneble, ne kapablas gvidi iun ajn militon, sed ĝi tiamaniere esperas, ke estante aliancano de grandaj potencŝtatoj, ĝi trovos ĉe ili defendon kontraŭ japanaj imperiistoj. Neatendite radio de espero lumigas la malhelan estonton de Ĉinio: Vilson predikas la memdifinon de nacioj. La granda norda demokratio proklamas "la grandan vorton". La esperoj de l' amasoj, la esperoj de ĉina inteligentularo kreskas. Venas la tago de Versajla paco, kiu alportas fordonon de la Ŝantunga provinco kun kvardek milionoj de ĉina loĝantaro en la manojn de Japanio. La ĝojo kaj la esperoj cedas lokon al la plej profunda malreviĝo . . . Sun, kiu dum la tuta tempo daŭrigis sian propagandon kaj estis ligita kun sia gepatra sudo, ne vidas eliron. Alrulas eĥo de la granda rusa revolucio. Anglaj kaj amerikaj telegrafaj agentejoj disvastigas pri ĝi ĉikanojn kaj kalumniojn, sed iliaj furiozaj atakoj pruvas al Sun, ke tie, sur la ebenaĵoj de Rusio, kreskas la nova forto, malamika al la monda imperiismo. Li komencas atenti la imformojn, venantajn el Rusio. La Versajlaj venkintoj deklaras al Soveta Rusio militon, aŭ, pli ĝuste, ili komencas sen militdeklaro bataladon kontraŭ ĝi por ekstermi ĝin. Sed ĝi defendas sin. Ĝi vekas en la laciĝintaj de milito popol-amasoj novajn gigantajn fortojn, ĝi dum du kaj duono da jaroj gvidas la heroan batalon kaj venkas Ententon. Sun plifirmiĝas spirite: li vidas en la rusa revolucio novan aliancanon.

Komence — ĝi estas por li nur la ekstera aliancano. Sun ankoraŭ ne komprenas, en kio estas la forto de l' rusa revolucio. Konkirinte la regpotencon en sudo de Ĉinio, en Kanton, li ne scipovas ligiĝi kun la popol-amasoj, por kiuj li estas nure granda patrioto, defendanta sendependecon de Ĉinio. Li ankoraŭ revas ke li sukcesos liberigi Ĉinion per helpo de diplomatiaj kombinaĵoj, militiroj, kaj ke post lia venko la alilandaj grandpotencoj por eviti militon forĵetos la provojn dividi Ĉinion kaj ekonomie helpos al Ĉinio. Sed venko de la Ruĝa armeo super Kolĉak detruas la baron inter Ĉinio kaj Soveta Rusio. Alvenas pli ĝustaj informoj el Rusio, alveturas rusaj revoluciuloj, ĉinoj veturas Rusion. La maljuna Sun ne ĉesas lerni. Li vidas sian dependecon de la burĝaro, de la kantonaj komercistoj, ne allasantaj iujn ajn esencajn reformojn, sen kiuj Sun ne kapablas fariĝi gvidanto de nacia revolucio. Kaj sen la nacia revolucio Ĉinio ne kapablas rompi la fortojn de militularo, kiu post falo de la dinastio dividis la grandan landon vivante je la konto de la disigitaj provincoj. Alianco kun Soveta Rusio, al kiu li celas, ne povas resti nure ekstere-politika kombinaĵo, ĝi venigas al movado la laboristojn (kiuj nun, se konsideri nur la uzinan proletaron, prezentas tri milionojn) ĝi komencas efiki je kamparanoj, kiuj ĝis tiu tempo kapablis krei nur la partizanajn taĉmentojn. La movado de laboristoj kaj kamparanoj elvokas kontraŭ-rimedojn de la burĝaro, kiu komencas organiziĝi, sin armi en Kanton kontraŭ Sun. Sun faras la decidan paŝon, komencas organizadon de revolucia armeo kontraŭ la burĝaro, prezentas programon de kamparanaj reformoj, programon en la regiono de laborista politiko. Sun-Jat-Sen komencas organizi la popolajn fortojn ne nur en Kanton, sed ankaŭ en Ĉinio ĝenerale. Li renkontas kontraŭstaron interne de sia partio, en ĝiaj medioj, ligitaj kun la burĝaro kaj batalantaj kontraŭ organizo de la popola revolucio. Sed Sun decidis. Nek minacoj de anglaj imperiistoj kiuj en la pasinta jaro preparas ofensivon kontraŭ Sun, nek minacoj de skismo en sia partio povas reteni lin; li elektis sian vojon kaj kiom ajn dornriĉa estas ĉi vojo, li persiste sekvas ĝin. Sur tiu ĉi vojo lin trafis la morto.

Antaŭ vi estas vivo de l' homo, kiu eniros la historion, kiel granda simbolo de la vekiĝo de l' plej granda en la mondo popolo. Antaŭ ni estas la vivo, plena de laboro, suferoj, menslaboro, bataloj; antaŭ ni estas la granda afero, komencita, sed ne finita, de Sun. Finos ĝin ĉinaj laboristoj kaj kamparanoj, ĉina laborula inteligentularo, kiujn estis vekanta Sun, kiuj vidis en Sun sian instruiston. La grandeco de vivo estas en tio, ke la homo, kiu ĝin travivis, ĉiam paŝis antaŭen, ĉiam estis leviĝanta post ĉia malvenko, studante sian sperton, lernante la novon. En sudo de Ĉinio komenciĝis revolucio de tajpingoj, kiu direktis sin al tio sama, al kio venis Sun post la tuta sia sperto, tra la politiko de konspiro, tra la politiko de diplomatio utiligo de la kontraŭdiroj inter imperiistoj. Sed la revolucia movado en Ĉinio troviĝas nun ne en tiu stato, en kiu troviĝis tajpingoj. Tiam, vidante suferojn de ĉina kamparanaro, per helpo de biblio kreis idealon de laborregno la granda antaŭveninto de Sun — Ĥung — gvidanto de tajpinga revolucio, mortinta en 1864 j. La ribelo de l' tajpingoj estis subpremita ĉar ĝi trovis neniun subtenon ĉe laboristaj amasoj de Eŭropo, kiuj eĉ ne sciis, kia granda tragedio okazas ĉe la bordoj de Jance. Nun la ĉina revolucia movado havas potencan aliancanon en rusa revolucio kaj en kreskanta forte monda proletaro. Eŭropa imperiismo ne povas komenci nun militiron kontraŭ revolucia Ĉinio sen riski elvoki profundajn ribelojn en siaj propraj landoj. Kaj la fortoj de Ĉinio mem senmezure kreskis dum tiu ĉi tempo. Por reteni nun en siaj manoj Ĉinion la fremdlanda kapitalo devus movigi milionajn fortojn. Tial la afero de Sun estos finita. Multaj suferoj atendas ankoraŭ ĉinan popolon, multon devos ankoraŭ lerni ĉinaj revoluciuloj por trovi subtenon en la popolaj amasoj de Ĉinio, sed la semo, plantita de Sun jam ne estos piedpremita, ĝi donos riĉajn fruktojn.

Ĉe la tombo de Sun, adiaŭante lin, trankvile kaj konvinke ni povas deklari: la tasko de lia vivo estos plenumita.

Elrusigis *G. Demidjuk.*

1) vidi n-on 28.

Litovio

Litovio, malgranda ŝtato, havanta pli ol 2 milionojn da loĝantoj sur terspaco de 50000 kilometroj kvadrataj, troviĝanta sur la teritorio okcidentparta de la cara Rusio, estinta dum longaj jaroj memstara, ricevis sian memstarecon en la jaro 1918. Sen eraro oni povas diri, ke la memstareco de la nuna Litovio estas falsigita. Ĉar la alianco, kiu tiel bele parolas pri justeco homa kaj popola, kiu uzas la "Ligon de Nacioj" kvazaŭ ludilo por propra utilo, ne donis al Litovio la memstarecon pro deziro de popolrajto, sed unue por ke ĝi povu fari baraĵon inter la "barbara Sovetio" kaj la venkita Germanio, kiu povos restarigi sian faligitan gloron nur se ĝi iros kune kun SSSR, — due, por ke ĝi havu, se estos la bezono, reton je malgrandaj ŝtatoj, kiuj defendu la eŭropan "kulturon kaj civilizacion" kontraŭ la "ruĝa danĝero".

Por diri la veron, — ne ekzistus memstara Litovio. Jam de longe ĝi estus parto federacia de militema Polio — la plej fidela servanto de la Francia kapitalo, — se regus unueco inter la alianco mem, t. e. inter Anglio, kaj Francio. Sed ĉar la interesoj de la du lastaj estas en la plej multaj okazoj alispecaj, malamaj, volas ĉiu el la du registaroj efiki sur kiu ajn difinita terpeco, regno aŭ kolonio. Litovio estas memstara nur, ĉar Anglio volas efiki sur la Balta maro, por ke ĝi povu senpere komerci kun SSSR. Se Litovio estus aldonita al Polio, mastrumus en tiu ĉi

regiono nur Francio. Tio estas nedezirinda por Anglio.

Sed la gardistoj de la mondjusteco en Eŭropo — Francio kaj Anglio — ekdividis inter si la grasan rabaĵon kiel amikoj. La memstara Litovio estas lando . . . kaj ĝia antikva ĉefurbo Vilnio estas aldonita per la ribelo Ĵeligovskia al Polio.

Kun certeco oni ankaŭ povas diri, ke Litovio estas ne nur politike falsigita, sed ankaŭ ekonomie malsana. La hodiaŭaj apogrimedoj de la Alianco estos baldaŭ elĉerpitaj pro politikaj cirkonstancoj. Sen apogo Litovio ne povos sin teni ankaŭ ekonomie. Ĉi tio estas tute komprenebla; ne per siaj fabrikejoj, kiujn ĝi preskaŭ tute ne havas, nek per siaj terlaboraĵoj, kiujn ĝi havas en ia grado, nek per siaj arbaroj, kiuj baldaŭ estos elhakitaj, ĝi povas konkuri kun la eksterlanda foiro por ke ĝia komercado havu normalan karakteron. Male, por ke la rusa kaj parte ankaŭ la amerika pano ne uzurpu la tutan foiron de la hejmlando, la registaro malpermesis enkonduki agraraĵojn el eksterlando. Sed tiu ĉi leĝo estis malforta pro la malbona rikolto en la nuna jaro en Litovio.

Ĉi tie kiel en ĉiuj burĝaj ŝtatoj ankaŭ regas "diverseco je opinioj" kaj "tendencoj" en politikaj, sociaj kaj ekonomiaj demandoj. Sed ĉi tie oni tion rimarkas pli ol en aliaj landoj pro difinitaj kaŭzoj, precipe pro la religia konservativeco kaj malprogreseco, en kiu sin trovas la loĝantaro, ankaŭ pro la senhonta ŝovinismo de la regantaj partioj.

La regantaj partioj ĉi tie estas jenaj: 1) la tiel nomataj "demokratoj kristanaj" kune kun de ili kreitaj markoj "Ligo de terposedantoj", kiuj volas prezenti kun si la vilaĝanojn, kaj "Federacio de Laboristoj", kiuj ankaŭ volas prezenti kun si la laboristojn. Ĝi estas partio, kiu ludas la rolon de papa agento, kaj la vatikano — la direprezentanto sur la tero, kiu celas ricevi sian efikon sur ĝi kaj elmontras sian aspiron precipe en la postmilitaj jaroj — povas fieri, ke krom Polio li ankaŭ ĉi tie trovis por si plej varman neston; 2) la "Popolanoj", kiuj sin prezentas kiel reprezentantoj de la urba burĝaro, etburĝaro kaj ankaŭ de la meza klaso vilaĝana. Ofte ili interŝanĝas la regadon kun la "demokratoj kristanaj". Pli bone dirite: pro personaj interesoj, aŭ kiel oni diras en Litovio: pro aferoj poŝaj ili sin ĵetas unuj sur la aliajn kvazaŭ du tendencoj. Sed kie oni vidas bonan negocon por ambaŭ, ili transiras el la opozicio en la pozicion kaj direktas kune la regnon kun favoro al la regnanoj . . .

Ne pli bone statas kun la pli malgrandaj partioj: "socialdemokratoj" kaj "progresanoj", kiuj lastaj sin nun titolis, pro malbona partistato, "naciistoj" kaj klopodas por la bienhavantoj. Tiuj ĉi du partioj estas en la opozicio jam de la jaro 1920 kaj batalas kun plumo kaj buŝo kontraŭ la nuna registaro. Sed la batalo estas nur pro tio, ĉar la pli grandaj partioj ne enkondukas ilin en la regnan koalicion, kvankam ili estas formale invitataj, kune kun la malplimulto, kiam oni ŝanĝas la registaron. Tio okazas kiel ordinare en Eŭropo, kie regas "bonkonduko", por ke oni vidu la demokratecon de la regno. En la vero ne estas dezirate, ke ili eniru en la koalicio, ĉar tiam la pli grandaj partioj perdus kelkajn ministrajn paperujojn, t. e. kelkajn varmajn lokojn por sampartianoj.

La "politika batalo", kiu regas inter la partioj, estas falsigita. Kiam oni devas disdividi ŝtelitan monon je honesta maniero (konstrui fervojojn, patrujajn konstruaĵojn) aŭ disdividi inter si bonan terpecon (tio nomiĝas ĉe ni "ter-reformo"), tiam oni fariĝas la plej bonaj amikoj, kaj interrilatas "kristano" kun soc-demokrato, "popolano" kun "naciisto".

Niaj vortoj estas bazitaj je faktoj. Se ni komencus kalkuli la faktojn depost la tempo kiam Litovio ricevis sian "memstarecon", ni atingos la milojn. La spekulacioj kaj ŝtelagoj estas diversaj, grandaj kaj malgrandaj. La eksministro Puriekis — sakarino, kokaino kaj specialajo — la linspekulacio; la eksministro Voldemaras — monŝtelo, pafilegkugloj plenigitaj je sablo anstataŭ pulvo; la forŝtelo farita de iu departement-direktoro (vestaĵoj, manĝaĵoj k. a. objektoj, ricevitaj el Ameriko por la litovaj malriĉuloj); la partoprenado de la litova registaro en la konata germana Kutisker-spekulacio, (la ĵurnalo "Vossische Zeitung" estas malpermesita en Litovio pro artikolo pri tio) kaj multaj aliaj — grandaj sumoj deŝiritaj de malriĉaj laboristoj kaj vilaĝanoj. Kaj antaŭ Eŭropo oni sin elmontras kiel honestaj (prave: por kio rajtas la amerikaj, anglaj, francaj kaj germanaj ministroj ŝteli kaj "akcepti donacojn"? . . .).

Ni forgesis, ke krom en ŝtelaĵoj unuiĝas la partireprezentantoj ankaŭ en alia afero. Ni parolas pri la komuna fronto kontraŭ laboristoj kaj vilaĝanoj.

La sinjoroj, kiuj krias — ĉiu en sia maniero — ke ili estas la senperaj kaj pravaj reprezentantoj kaj defendantoj de laboristoj, kondukas komunan bataladon kaj tenadas komunan fronton kontraŭ la samaj laboristoj kaj vilaĝanoj, kiam la lastaj postulas pli bonajn laborkondiĉojn, pli homajn rilatojn al si (ĉar se vi ne estas oficisto, sinjoro aŭ mon- kaj bienhavanto, vi ne estas certa, ke oni vin ne arestos kaj turmentos kiel ŝtatperfidulon), organizliberecon, parolliberecon (la konstitucio estas papero kaj ĝi kuŝas en la arkivo). Kaj estas sankta devo por la partireprezentantoj, ĉiam montri kaj senkaŝe krii, ke la laboristoj aŭ vilaĝanoj, ekstariĝantaj por supre nomitaj postuloj — estas bolŝevikoj, komunistoj kaj perfiduloj de la patrujo (la kompartio estas ĉi tie malpermesita, sed ĝi vaste laboras). Kien tio kondukas, estas konate. Tiu, kiu kuraĝas elstarigi la postulojn je kunveno, certe estos arestita, kaj oni lin turmentos en la politik-policejo per elektrigo (progreso, ĉu ne?), per purigilo de pafilo; per batoj oni difektos liajn koron kaj pulmojn, por ke li konfesu, ke li estas komunisto. Se la politik-policanoj ne povis elmontri lian kulpon, li tamen estos enkarcerigita dum 2—3 jaroj, ĝis la juĝceremonio (la sinjoroj el Litovio parolas senhonte: se vi estas kulpa — havu vian punon; se ne — sciu, ke oni ne devas iri al laboristkunvenoj kaj paroli tie). Se ĉe li estas trovita ĵurnalo aŭ libro malpermesita, li ricevas je kvar jaroj da karcero ĝis plumba kuglo (la lasta ne estas esceptita).

Por batali kontraŭ la "internaj malamikoj", estas pagataj spionamasoj, policanoj sekretaj kaj malkaŝaj, ĉirkaŭ 10000 pafistoj (Ŝauliai) kaj, se oni bezonas, ankaŭ la armeo. Ĉiuj ili kostas milionojn deŝiritajn de la malriĉa loĝantaro.

Kaj se oni devas, oni ne hontas pafi en senarmitajn laboristojn, kiuj postulas lupagon anstataŭ 5 lidojn 7 (2 germanaj ormarkoj). Tio okazis la 19. januaro 1925 en la litova ĉefurbo Kaunas. Estis vunditaj 35 uloj. Kio okazas en la provinco, oni facile povas imagi.

Tiel oni agas ne nur kun laboristoj kaj vilaĝanoj, sed ankaŭ en la litovaj universitato kaj gimnazioj oni faradas traserĉadojn ĉe la profesoroj, docentoj, asistantoj, instruistoj, studentoj kaj lernantoj. Oni ilin arestas kaj turmentas kiel "perfiduloj de la patrujo".

Ni ankaŭ diros kelkajn vortojn pri la juĝo. Kiel ĉio ankaŭ la juĝo ĉi tie estas malhonesta Nur ĉar spionoj diris, ke la laboristoj Ivanovski, Ratnik, Baj kaj ankoraŭ unu disĵetis alvokojn, ili estis juĝitaj en la fino de la jaro 1924 al morto. La 17 jara laboristino Baj ricevis ankaŭ pro tio malliberejon ĝis la fino de vivo. La juĝatoj pro aparteno al la komunista partio ricevis: Gedris 8 jarojn, Ĥackeleviĉ 8 j., Lifŝic 8 j., Preikŝas 6 j., Lukoviĉ 4 j. kaj Ŝulman 6 j. da punlabora vivo. Multe da arestitoj ankoraŭ atendas sian juĝon. La malliberejoj estas plenigitaj je arestitoj politikaj.

En la sama tempo oni ne hontas liberigi la grandŝtelistojn, kiel ekz. la eksministron Purickis. La plej alta tribunalo motivis, ke "per tio estas purigita la hontmakulo de la litova popolo". Komprenеble, honesta juĝo devas tiel fari: se ministroj, pastroj kaj regantoj ŝtelas, ili devas esti liberigitaj, — alie, ĉi tio malpurigus la litovan popolon: sed laboristoj kaj vilaĝanoj, kiuj postulas laboron, devas esti mortpafitaj aŭ enkarcerigitaj, ĉar ili estas perfiduloj de la patrujo.

La senhonta litova juĝo volas esti populara kaj montri al sia sinjoro, la eŭropa kapitalismo, ke ĝi bone staras je gardo. Ĝi preparas unufojan juĝon je 300 tiel nomataj "grupianoj". Inter la 300 estos deputitoj el la "laborgrupo" en la litova popolkonsiliĝo, reprezentantoj el la profesiaj kaj klerigaj asocioj, laboristoj, vilaĝanoj, soldatoj, instruistoj, kuracistoj, lernantoj kaj aliaj. Sed la esplorado jam daŭras la trian jaron, kaj dume putras la plej bonaj homoj el la lando en la karceroj, perdas sian sanon. Kaj la senhontaj fariĝas kaj estas iliaj juĝistoj.

La aferoj supre prezentitaj estas nur malgranda parto el la arbitro de la litova burĝaro, pastroj kaj bienhavantoj. Dum la litova memstareco oni povas kalkuli la viktimojn: centojn da mortpafitoj kaj milojn da enkarcerigitoj.

Sed ne opiniu, ke la nuna litova registaro nenion faras por la favoro de popolo kaj lando . . . Ili konstruas por si fabrikejojn, ili prenas por si bienojn kiel terreformo, kaj pro la danĝero, kiu alproksimiĝas kaj certe venos, ili aĉetas por si vilaojn (somerloĝejojn) kaj domojn en Svislando, Italio, Anglio, Francio kaj aliaj lokoj en Eŭropo. Krom tio oni konstruas preĝejojn kaj monaĥejojn.

La stato en la lando estas malfacila kaj la humoro premita. Tio ne povas esti aliel: la senlaboreco estas granda, la ŝarĝoj estas grandegaj, kaj je ĉiu paŝo oni estas persekutataj.

Malgraŭ tio la kompartio — kiu, kiel estas dirite laboras kaŝe — ricevas la plej grandan influon je la laboristaro kaj vilaĝanaro, kiu per la praktiko jam scias, kion signifas "demokrateco" kaj "nacieco". Multaj el ili, kiuj ankaŭ estis timigitaj dank' al la pastraro per la vorto "komunismo", nun estas disĉiploj de komunismo. Tio estas bone konata al iliaj najbaroj.

Pli grandan signifon havas la fakto, ke la armeo edukita per devigo kaj laŭ reĝimo cara estas plejmulte tie maldekstra. La armeo malamas la pafistojn kaj je ĉiu renkonto la soldatoj batas la pafistojn.

La sinjoroj nunaj en Litovio agas bone, ke ili aĉetas bienojn en la okcidentaj landoj eŭropaj. Ili certe baldaŭ devos translokiĝi tien. Sed ĝis kiam ili povos vivi tie trankvilaj, dependos de la mondproletariaro. *I. N. (Malliberejo).*

TRA LA KLASBATALO

La belgaj balotoj por parlamento havis jenajn rezultojn: 79 socialistoj, 78 katolikoj, 22 liberaluloj, 2 komunistoj, 6 diversaj.

La kapitano Sadoul, akuzita pro landperfido, estas liberigita per 4 kontraŭ 3 voĉoj de la tribunalo en Orléans. Tio estas sukceso de la franca proletaro.

La registaro Herriot estas faligita. Nova registaro ankoraŭ ne estas formita.

Lordo Balfour vizitinta Palestinon estas akceptita per atakoj kaj minacoj de la loĝantaro en Damasko, kiun li rapide forlasis.

La voĉdonrajto por virinoj en Francio estas akceptita per 390 kontraŭ 183 voĉoj.

Hindenburg estas la kandidato de la dekstraj partioj en Germanio por la dua balot-iro al regnoprezidanta elekto.

Tiĥon, la kontraŭrevolucia rusa patriarko, kiu poste submetiĝis al la sovetpotenco, estas mortinta.

NE FORGESU LA VARBADON!

Rezultoj de la revolucio en ciferoj

Ekonomia bonstato de laboristo kunmetiĝas el plej diversaj elementoj. La salajro kaj vivprezoj ne tute komplete karakterizas ĝin, se ni malatentas la faktorojn de socia asekurado, de impostoj ktp. Tial ne nur interese sed ankaŭ utile estas studi statistikojn, montrantajn evoluon de tiaj faktoroj. Kelkaj ŝubaj ciferoj estas ĉerpitaj el nunjaraj informlibroj kaj revuoj kaj permesas al ni iom vidi rezultojn de la rusa revolucio en la ĝenerala ekonomio de Sovetio.

Unue pri impostoj. Bulteno de financa fako de Moskva Soveto donas jenan tabelon pri interrilato de diversaj kategorioj de impostpagantoj al kvanto de la impostsumo de ili pagata:

	% de pagantoj al la tuta nombro de pagantoj	% de pagata imposto al la tuta sumo
Laboristoj kaj oficistoj	41	8
Hejm-industriistoj kaj liber-profesianoj .	40	16
Vivantoj je senlaboraj enspezoj . . .	19	76
	100 %	100 %

Do laborularo pagas nur 8 % de la tuta impostoŝarĝo kaj la tuta impostopezo estas metita sur la ŝultrojn de tikiuj ĝis nun konservis deziron vivi je la kosto de alies laboro. Tio kompreneble havas siajn signojn en la konsisto de Moskva loĝantaro. Informlibro "Tuta Moskvo" por 1925 jaro donas jenan kompartabelon pri socia stato de la loĝantaro en 1912 kaj 1923 j. j., — jaroj kun preskaŭ egala nombo de loĝantoj (1 617 700, respektive 1 511 025)

Inter la plenaĝula loĝantaro estis:

	1912 j. nombro	en % al sumo	1923 j. nombro	en % al sumo
Laboristoj .	406 293	40,2	219 059	28,2
Hejmservistoj	170 263	16,8	63 818	8,2
Oficistoj . .	164 047	16,3	225 886	29,1
Liber-profesianoj (kuracistoj ktp.)	10 501	1,1	10 300	1,3
Mastroj kun dungitaj laboristoj .	38 138	3,8	5 053	0,7
Mastroj sen dungitaj laboristoj .	65 906	6,5	70 310	9,0
Vivantoj je % de kapitalo	25 289	2,5	1 917	0,3
Pensiuloj .	99 156	9,8	84 868	11,0

Ni povas konstati el tiuj ciferoj sufiĉan malkreskon de la kategorioj, serĉantaj siajn vivrimedojn en laboro de aliuj; sesoble malkreskis meze la nombro de mastroj kun dungitaj laboristoj kaj de vivantoj je % de kapitalo, pli ol duoble malkreskis la nombro de hejmservistaro, priservinta antaŭe la du ĵus nomitajn kategoriojn. Malpliiĝo de laboristaro estas klarigebla per certagrada ruiniĝo de industrio dum la militaj kaj revoluciaj jaroj, kresko de oficistaro — per transporto de registaraj oficejoj en Moskvon kaj parte ankaŭ per ĝenerala kresko de administra aparato.

Estus interese vidi en Sennaciulo similajn kompartabelojn por aliaj landoj, en kiuj okazis revolucio. *1516.*

El Polio

Granda senlaboreco

14. marto en "Kongresa Polio" estis 186 000 senlaboruloj (laŭ la oficiala statistiko de la organizaĵo por distribui laboron): 18 400 foslaboristoj, 27 500 metallaboristoj, 35 700 manufaktur-laboristoj kaj 45 000 aliaj industrilaboristoj. Nur 86 520 el ili ricevas treege malgrandan subtenaĵon, kaj 7. aprilo finiĝis limtempo por la ricevo de iliaj subtenoj. La supraj ciferoj nur rilatas la enregistritajn senlaborulojn, tamen la vera nombro estas multe pli granda, ĉar grandega nombro el la malgranda industrio kaj la komizoj ne estas enskribitaj pro la malfacilaĵoj kiuj estas farataj al tiuj, kiuj volas enskribiĝi. Krom tio estas multaj senlaboruloj en la jugataj landoj tiel nomataj "finlandoj okcidentaj" kaj "finlandoj orientaj".

Nun tiu ĉi lando, kiu ne povas nutri siajn loĝantojn, kiu post dissendo de siaj loĝantoj al Francio, Meksiko, Palestino kaj aliaj landoj havas ankoraŭ tiom da senlaboruloj, kaj — plenajn malliberejojn kun politikaj malliberuloj, — volas okupi la liberan havenon Danzig (Gdansk)! *Biel*

Salajroj de pastroj kaj laboristoj

Inter Polio kaj paprezidejo estas subskribita "konkordato" (intertrakto), kiu reguligos la eklezi-aferojn en Polio. Unu el la paragrafoj de l' konkordato koncernas la salajrojn de nia pastraro. Iliaj "perlaboroj" estas jenaj:

Kardinaloj ricevas 1025 zlot. pol.[1]) kaj krom tio 800 zlp. por elspezoj je kapelanoj, kaleŝoj ktp.

Ĉefepiskopoj: 820 zlp. plus 600 zlp. por elspezoj je kapelanoj, kaleŝoj ktp.

Episkopoj diecezaj: 697 kaj 600 zlp.
Episkopaj helpantoj: 510 zlp.
Kapitulanoj: 241 zlp.
Prepostoj: 110 zlp.

Tiom pagos la registaro al pastraro de depagoj, eltiritaj el laboristoj kaj kamparanoj. Sed tiom ne sufiĉas! La pastraro havos krome enspezojn de terpecoj, kaj krom tio la prepostoj havas multe da mono de diversaj edziĝoj, baptoj, entombigoj, de kristnaska donaco ktp.

Kiomaj estas la perlaboroj de laboristoj?

En metalfabriko de Rudski apud Varsovio: kvalifikita laboristo perlaboras ĉiutage 6 zlp., t. e. pli-malpli 150 zl. monate[2]), simpla laboristo — 3 zl. aŭ 75 zl. monate.

En vaksminejo en Borislav la salajroj estas jenaj: laboristo de unua kategorio 4 zl. aŭ 100 zl. monate, de 3. kategorio 2 zl. 50 gr. aŭ 62 zl. monate.

[1]) dolaro = 5 Zl. 18 gr.; 1 Zl. = 100 groŝi.
[2]) Ili laboras ne ĉiutage.

En tabulsegejoj de Orienta Galicio la meza salajro de laboristo estas: 1 zl. 50 gr. aŭ 40 zl. monate.

El "Zycie Zwiazkowe" trad. H. H.-n Lublin

La katastrofoj en Usono

Minkatastrofo en Usono, Fairmont, W. Va.

Du mil futojn en la profundaĵo de minejo ĉe Barracksville entombiĝis 34 ministoj. Terura gaseksplodo ĉiun vojon distranĉis al la taglumo, al la vivo, al iliaj familioj. La kaŭzo de l'eksplodo estas neklarigita (?). Savolaboristoj laboris senlace por trovi la kamaradojn aŭ vivajn aŭ mortajn. Sed ĉia espero estis vana. Tri tagojn depost l'akcidento la savistaro fosadis, sed ankoraŭ havis antaŭ si la taskon fosadi tra pluaj mil futoj da detruitaĵo. Nenia dubo pri la sorto de la entombigitoj restas, nur mortintajn oni ilin trovos.

La kaŭzoj de mineksplodoj nenie estas klarigitaj, sed ni scias, ke preskaŭ ĉie la ekspluatistoj nur zorgas, ke el la karbo fariĝu oro, mono, sed malzorgas pri la sekureco de ti-kiuj per sia laboro ilin riĉigas.

Tra la tuta mondo preskaŭ ĉiutage ministoj estas murditaj pro malzorgeco. Ni ekkomencu raporti pri tiuj krimoj de la kapitalismo. El ĉiuj landoj konstante donu informojn kaj la fakto de la ĉiutaga murdado rakontota al ĉiuj, kiuj jam morgaŭ estas murdotaj, forĝos sincerajn kunbatalantojn por la finfina liberigo.

Turnventego furiozis tra kelkaj ŝtatoj de Usono.

1000 personoj pereis kaj 4000 estas vunditaj en la plej detrua turnventego kiu iam ajn vizitis la landon.

Dekduo da plenloĝitaj urboj estas plene detruitaj kaj plia dekduo estas difektita ĝis neloĝatebleco. Kvin ŝtatoj estis tuŝitaj de la terurigaj uraganoj: Misuri, Ilinojs Indiana, Kentuki, Tenesi.

Fajro sekvis en multaj lokoj.

La plena fortego de la ventego koncentriĝis sur Murfisboro, IL. Tiu ĉi urbo estis praktike ebenigita. La sama sorto trafis De Sota kaj Vest-Frankfort.

Triono el la mortintoj estas infanoj, kiuj estis studantaj en la lernejoj kiam la naturo ekribelegis. En la lernejo de Murfisboro 100 dum momento estis mortŝutitaj.

La unua loko, kiun la turnventego tuŝis kaj detruis, estis Anapolis. Nur unu domo, strange, estis tute ne tuŝita. Domoj estis distranĉitaj en duonoj, unu duono disblovita en ĉiujn direktojn, la alia ne tuŝita. Aŭtomobilo estis blovata tra la tegmento de l'aŭtomobilejo. Ŝtala fervojo-signalturo estis tordata kiel ŝnuro. Domo kaj meblaro dispecetigitaj, sed fortepiano restis ludebla. Korpoj estis forblovitaj mejlon kaj pli ol mejlon. Brakoj kaj kruroj detorditaj per la forto de la ventego. Flugantaj lignopartoj tratruigis la korpojn. Virino estis trovita kun bastono borita tra la kapo. Peco da ligno estis borita tra arbo. Ja, oni trovis objektojn eĉ 35 mejlojn for de iliaj iamaj starlokoj.

Resume, la turnventego estis la plej furiozega, kiu iam ajn invadis la landon.

Tendurboj konstruiĝis, en kiuj la miloj da vunditoj estas flegataj, se ne fortransporto estas absolute necesa.

Verŝajne, la plej multaj el la lokoj ne estas rekonstruotaj. *Nekmoko, 1307.*

DIVERSAĴOJ

Spirita reakcio en Usono

Ŝtatestro Austin Peay subskribis bilon kiu senleĝigas la instruadon de "evolucia teorio" en la lernejoj de Tennesee (legu: Tenesi). La ŝtatestro, kiu estas profunde religia, diras ke la biblio malpruvas la evolucian teorion. Sinjoro Arthur Brisbane, redaktoro de Hearst'aj gazetoj, donas jenajn komentojn pri tio: Jen la afero estas solvita, kaj ĉiu en Tennesee devas esti feliĉa. Sed oni povas plilarĝigi la punkton. Povus esti leĝigita kaj subskribita de la ŝtatestro alia bilo, kiu malpermesos la instruadon, ke la tero estas ronda.

La biblio ankaŭ tion "malpruvas", ĉar estas skribite en Apokalipso: "Kaj post tiuj aperaĵoj mi vidis kvar anĝelojn, kiuj staris sur la kvar anguloj de la tero, tenante la kvar ventojn de la tero, por ke la ventoj ne estu blovantaj sur la teron, nek sur la maron, nek sur iun ajn arbon."

La aserto ke la tero havas kvar angulojn, estas sendube absoluta pruvo, ke ĝi ne estas ronda. La klera ŝtatestro de Tennesee, en libera tempo, povus legi iun libreton pri embriologio. Koncerne antaŭnaskan evolucion, li surpriziĝus, se li povus vidi sin dum sia duamonata embristato, ĉirkaŭ sep monatojn antaŭ kiam li naskiĝis. Oni eĉ prefere devenus de simio ol de sessemajnaĝa embria estaĵo, kiu estas teruraspekta kreaĵo. *Sciigis G. S*

Preĝejoj pereu!



Ĝenerala parto de l'manĝejo, aranĝita por laboristoj de l' teks-fabrikoj: "Tvera Proletino" kaj "Vagĵanka" en la ejo de eks-preĝejo (Tver).

Antireligia Muzeo!

En la ejo de l'eks-Kievo-Peĉera baziliko malfermiĝas *antireligia* muzeo. Pro la kvanto de l'ekspozaĵoj la kieva antirel. muzeo estos la unua en Sovetio. La muzeo enhavos plej maloftecajn kaj valorajn ekspozaĵojn, rilatantaj la kulton de ĉiuj religioj.

Unua fabrik-kuirejo![1]

La 8. marto (internacia laboristina tago) okazis la inaŭguro de l'unua sovetia *fabrik-kuirejo* en Ivanovo-Voznesensk, unu el plej gravaj industriaj urboj de l'Centra Rusio.

Ĉiu devas konstati la gravecon de ĉi-okazaĵo, ĉar ĝi estas speciale valorhava en lando, kie la virino suferis ĝis la lastaj jaroj pli ol en aliaj landoj de Eŭropo pro malfacilaj ekonomiaj kondiĉoj.

La ekfunkcio de ĉia institucio, permesanta la substituon de l'malnova diseca vivmaniero per nova, pli racia, pli komfortoza, kolektiveca, signas novan progrespaŝon sur la vojo al efektivigo de socialismo.

Ĝi estas nova sukceso sur la vojo de l'liberigo de la virinaro el la malnova hejm-servuto.

Kion prezentas el si la Ivanovo-Voznesenska fabrik-kuirejo?

La fabriko lokas en kelkaj ejoj: unu estas la *Kaldronejo* (vasta 270 kvadr. m.), kie troviĝas kaldronoj, nutrantaj per vaporo la fabrikon kaj la manĝejon.

En alia trietaĝa ejo estas deponejo kaj malvarmejo; en la lasta estas nuntempe konserveblaj 50000 kgr. da facile malboniĝemaj produktoj. La kuirejo enhavas 19 vaporajn nutraĵ-kuirajn kaldronojn,

1) Laŭ la ĉiutaga organo de l'Tutsovetia Centra Konsil. de Prof. Sindikatoj "Trud" (Laboro).

konstruitajn laŭ la "lasta vorto de l'tekniko", kaj, krome, du "ekonomiajn" fornojn grandegajn.

Apude troviĝas speciala maŝin-fako por prilaborado de l'legomoj (du terpom-purigiloj, du terpom-laviloj, legom-elpremilo, legom-tranĉilo ktp.). Estas speciala ĉambro por la viand-tranĉado. Oni ankaŭ starigas elektrajn pantranĉilojn, lavilojn por forkoj, tranĉiloj kaj cet. Lift-sistemo permesas la transporton de l'produktoj el la deponejoj al kuirejo kaj de l'preparitaj manĝaĵoj al la manĝejo, lumoza salono, troviĝanta supre.

La manĝejo povas priservi per tagmanĝoj ĉiutage 2000 h. Sed la ĉefa konsumantaro de l'nutraĵoj estos — la laboristoj kun familianoj, loĝantaj en la ĉirkaŭaĵo de l'fabriko. Al tiuj la manĝaĵojn liveros 90 "termos'oj" (veturigeblaj varmigiloj).

Apud la manĝejo en salono, vasta 225 kvadr. metrojn, funkcias biblioteko kaj kultur-angulo. *Dneprano.*

Novaj arestoj en Bulgario

La bulgara burĝaro jam estas kutiminta kulpigi la laboristojn kaj kamparanojn, ĉar ili estas malamikoj al nuna faŝista reĝimo. Laŭ oficialaj gazetoj burĝaj, tage kaj nokte, oni malkaŝas konspirantojn, malamikojn de la nuna registaro. La registaro jam elpensis sistemon por la arestoj de laboristoj kaj kamparanoj. Tiel ĝi aranĝis metode grandajn arestojn en urboj Sofio, Ruse, Burgas k. a.

La faŝista registaro ne povas sufoki alimaniere la laborist-kamparanaran movadon, kiu de tago al tago plilarĝiĝas tra la tuta lando. Oni hodaŭ klare povas ekkoni, ke laboristoj kaj kamparanoj ekgrupiĝas ĉirkaŭ la devizo: "unuecfronto" kaj la devizo: "laborist-vilaĝana ŝtato". Jam timegas faŝistaro, vidanta kiel estas minacata ilia bonvivo. Sed vanaj restos ĉiuj ĝiaj penoj kaj perfortoj, por estingi la unuecan laborist-kamparanan movadon.

La 21. marto frumatene la burĝaj gazetoj anoncis ke la policistaro trovis sekretan kom-presejon en la korto de la eterna(?) ministrejo. Tie oni trovis propagandfoliojn kaj unu manifeston: Al Bulgara Popolo! En la presejo ne troviĝis unu sola homo. Saman tagon oni malkaŝis en urbo Ruse novajn "konspirantojn". Sekvis pograndaj arestoj.

Lastmomente la gazetoj anoncas pluajn arestojn en urbo Burgas, inkluzive lernantoj. Ankaŭ en Sofio la policanoj kaptis 15 studentojn. Tiel okazas tra la tuta lando.

Ĉar la registaro ne scias, kiel pacigi la landon, ĝi provas tion per detruo de ekonomiaj kaj politikaj organizaĵoj laborist-kamparanaj kaj per malpermeso de iliaj gazetoj. Sed ĝuste per la ruinigo de la laboristaj institucioj oni plimalbonordigas la ŝtatordon, anstataŭ sanigi la landon. Tamen la registaraj saĝuloj eksteren fanfaronas, ke la paco en la lando estas certigita. *Zdravejkin.*

D I S K U T E J O

Pripensoj

En sia artikolo: "Ĉu dikredanto povas esti SAT-ano?" k-do Fr. Gauch[1]) penas solvi ĉi-problemon, laŭ mi, iom arĥaisme. Lasante flanke liajn revojn pri la "efektive komunismaj" pratempoj de l'unuaj kristanoj, ĉar similaj revaĵoj povus alkonduki nin al tempo, eble, eĉ pli "enviinda" — la epoko de prakomunismo, mi nur volas, profitante la okazon, repliki al du-tri tezoj de l'aŭtoro, kiu, evidente, en sia religia koncepto elmontras tendencojn de t. n. agnostikismo. Do kio estas agnostikismo? — "Agnostikismo, t. e. filozofio de nescio, alivorte — pozitivismo, . . . en kelkaj siaj varioj, kiel prave rimarkas Engels en la verko pri L. Feuerbach, prezentas esence nur honteman, maskitan materialismon (kaj iafoje similan idealismon[2]). Ĉu la leganto eble dubas pri agnostikemo de k-do Gauch? Ni do aŭskultu lin parolanta. "La scienculoj, — li diras, — ĝis nun ne sukcesis pruvi, ke kreinto ne ekzistas, aliflanke scipovo pri homa spirito estas tre malkompleta, kampo ĝis nun ne sufiĉe esplorita, plej ofte hipotezoj — la sciencaj asertoj." Nu, la pritraktata problemo ne estas en tiom plorinda stato, kaj pri tio plej trafe atestas jenaj vortoj de Fr. Engels:

"Naturkompreno de agnostikanoj estas ĝisfunde materialisma. En la universo regas leĝoj, absolute malpermesantaj ajnan influon je ĝi de ekstere. Sed — la agnostikano aldiras singardeme, — ni ne povas pruvi ĉu ekziston ĉu neekziston de l'supera estulo en la transcenda mondo. Ĉi—rimarko povus havi sian valoron tiuepoke, kiam Laplas', demandite de Napoleono, kial la granda astronomo en sia "Ĉiela Mekaniko" eĉ ne unu fojon mencias la kreinton, fiere respondis: "Al mi ne estis bezona ĉi-hipotezo." Sed hodiaŭ nia koncepto pri la mondo en ĝia evoluo rezervas absolute neniun lokon ĉu por kreinto ĉu por reganto."

Plue Fr. Gauch asertas, ke la dikredo (religio) ne estas "tiom" danĝera al socialismo kaj "eĉ" anarkismo, — oni nur estu monoteistoj . . . Kaj precipe la artikolverkinto simpatias kun Jesua doktrino, kies "la verajn tendencojn li rekomendas al socialismo kiel disvastigendajn . . . Ĉu la aŭtoro kredas trovebla personon, kiu sin okupos elekti tiujn "verajn tendencojn" el la "Jesua doktrino — por krei ian novan "proletaran religion" kun speciala "socialista pastraro"? Vana espero! Eĉ menciita de li Tolstoj ne sukcesis fari similan. Kaj se la aŭtoro nepre volas "ion lerni el la taktiko de ekspluatistaro, kiu ja mem nenion kredas", do, mi pensas, lernenda estas ĝuste ĉi-tio — nenion kredi". Pli bone, ni entute lasu por ĉiam, kiel sentaŭgaĵon, ĉiujn religiajn doktrinojn, pri kiuj jam en XVII. jarcento prave skribis Tomaso Gobbz, ke "ili similas sanigajn, sed amarajn pilolojn, kiujn oni devas engluti, kaj neniel tramaĉi, — aliokaze plej ofte ili estos elkraĉendaj." Mi ja estas certa, ke la verkinto de l'artikolo neniel volas destini por la proletaro la sorton de estulo, dum sia tuta vivo jen englutanta, jen, eventuale, vomanta tiel bonguste preparitan medikamenton . . .

Sian artikolon k-do Gauch finas, klopodante evitigi al la kredanta socialisto "konflikton kun sia animo". Per tiuj vortoj li, sendube, aludas la principon de konscienca libereco. Nu, kompreneble, proletaro bezonas kaj ŝategas liberecon, sed — kian? Ŝajnas al mi, ke ĉiu SAT-ano, ĉar li ne povas rilati indiferente al "la klasaj celoj de la laboristaro", konsentos kun ĉi—rezonadoj de Lenin, kiuj estu konkludo de pripensoj, inspiritaj al mi per la supre citita verko de k-do Gauch.

"Libereco estas granda afero, sed sub lozungo de l'industri-libereco oni kondukis la plej rabistajn militojn, sub lozungo de l'labor-libereco oni prirabis la laborulojn. Saman falsaĵon enhavas ankaŭ la moderna vortuzado: la kritik-libereco. *Homoj, vere konvinkitaj pri tio, ke ili antaŭenpuŝis la sciencon, ekaspirus ne al libereco de l'novaj opinioj egale kun la malnovaj, sed al ŝanĝo de l'lastaj je la unuaj*[3]). Densamasiĝinte ni marŝas nian abruptan kaj malfacilan vojon, forte interpreninte la manojn. Ĉiuflanke nin ĉirkaŭas malamikoj, kaj preskaŭ ĉiam ni devas iri sub iliaj fajropafoj. Laŭ decido, libere alprenita, ni unuiĝis ĝuste por kontraŭbatali malamikojn kaj ne trafi, faletinte, la apudan marĉon, kies loĝantoj de post komenco mem riproĉis al ni, ke ni apartiĝis kiel izolularo, preferinte vojon de batalo ol tiun de paciĝo. Kaj jen kelkiuj el ni ekkriadas: "Ni eniru ĉi-marĉon!" Kaj en okazo de ies hontigoj ili refutas: "Kiom malprogresemaj vi estas. Kaj ĉu efektive vi ne hontas forrifuzi al ni la liberecon inviti vin al vojo pli bona?" — Ho, jes, sinjoroj, vi estas liberaj ne nur inviti, sed ankaŭ iri ien ajn laŭ via plaĉo, eĉ se en la marĉon. Eĉ ni opinias marĉon ĝuste via natura sidejo, kaj ni estas pretaj laŭ niaj fortoj akceli *vian*[3]) tienan transmigradon. Nur lasu tiam niajn manojn, ne vin alkroĉu je ni nek profanu la grandan vorton "libereco", ĉar ni ja ankaŭ estas "liberaj" iri kien ni volas, liberaj batali ne nur kontraŭ la marĉo, sed ankaŭ kontraŭ ti-kiu devojiĝas marĉendirekte." (Lenin, "Kion oni faru?").

V. Zamjatin.

1) Vidu "Senn.", n-o 23.

2) B. J. Gorev. "Materialismo — filozofio de proletaro".

3) Substrekita en la originalo.

Por amuzo

La fantomo de l'komunismo vagas tra Eŭropo

Ĉi tiun fojon lerte kaŝita sub manteleto de Revuo por popola edukado "Novaj Tempoj", la oficiala organo de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj-Esperantistoj.

Sed unu fervora litova katolika instruisto ekkonis la lupon en ŝafa felo, kaj teruro ekkaptis lian paŝtistan koron. Per laŭtaj krioj li avertas la ŝafaron pri la proksima danĝero, kaj skribas en n-o 7 (julio 1924) de "Litova Stelo":

"Traleginte en la junia n-o de "Lit. Stelo" la alvokon de s-ro Oželis-Kazlauskas, varme rekomendantan la "Tutmondan Asocion de Geinstruistoj-Esperantistoj" kaj ĝian oficialan organon, "Novaj Tempoj", mi atente tralegis la lastan n-ron de tiu ĉi gazeto, kaj jen kion mi en ĝi trovis:

1) "Novaj Tempoj", kvankam nomas sin "Revuo de popola edukado", tamen por popolaj instruistoj donas preskaŭ neniajn pedagogiajn sciaĵojn.

2) Estante samtempe oficiala gazeto de "Internacia Ligo de Liberpensuloj", "Novaj Tempoj" estas gazeto ne pedagogia, sed antireligia, komunista. Ĝin redaktas ne ia s-ro, sed k-do M. Goldberg.

3) La komunista tendenco de tiu ĉi gazeto vidiĝas el artikolo de A. Paramonov pri "Altaja Gubernia lernejo je la nomo de 3-a Internacio en Barnaul-Siberio", la antireligia el artikoloj: "La eklezio kaj lernejo en Anglio", "Kiam mi volis katolikigi mian avon" k. a.

4) La nova edukado, kiun rekomendas "Novaj Tempoj" estas komunista.

Sin fondante sur tio ĉi mi sentas mian devon averti miajn gekolegojn, litovajn katolikajn instruistojn, ke ili nek aliĝu al tiel laŭdata de s-ro Oželis-Kazlauskas "Tutmonda Asocio de Geinstruistoj-Esperantistoj" ĉar ĝi estas malkaŝe komunista, nek abonu "Novajn Tempojn" pro ĝia malkaŝe antireligia kaj antikatolika tendenco.

Instruisto L. P-is."

Komunikis *H. Frank* (Leningrad).

Oni sendis leteron al eksterlandaj laboristoj

(El vivo de l' ruĝa kazerno)

Hodiaŭ en nia anguleto de Lenin estas eksterordinara bruo. Oni decidis skribi leteron al eksterlandaj laboristoj.

— Sed kiel ni sendos ĝin tien, ekz. en Amerikon aŭ Francion?

— Ĉu ni ricevos respondon?

— Ĉu ĝi ne estos difektita de eksterlandaj kapitalistoj? — jen demandoj pri kiuj interesiĝas ruĝarmeanoj.

Militkomisaro donis sufiĉajn respondojn al la demandoj. Estis elektita komisiono el 5 personoj, al kiu oni komisiis skribi la leteron. Poste ni ĉiuj konfirmos ĝin kaj forsendos per Centra Komitato de Komintern. Oni balanciĝis siajn "eksterlandajn prezentantojn".

Longe ankoraŭ oni vigle interparoladis pri stato de laboristoj en la kapitalistaj landoj kaj pri ebleco ricevi la respondon.

Militkorespondanto Irkutov
(elrusigis SAT-ano 4112, ruĝarmeano[1]).

El tiu ĉi malgranda noteto estas videble, ke ruĝarmeanoj interesiĝas pri la stato de eksterlandaj laboristoj. Mia peto iras al eksterlandaj laboristoj ke ili respondu esperantlingve, ke ruĝarmeanoj vidu gravecon de esperanto, per kiu oni povas korespondadi kun laboristoj sendepende de Kominterno. *La tradukinto.*

1) Laŭ "Ruĝarmeana stelo" n-o 33 — 20. feb. 1925.

KRONIKO

Britio

London. Antaŭ 6 monatoj okazis kurso ĉe la meblista unio. Nun la studantoj kunvokis kunvenon de lokaj esp-istoj por fondi grupon. La ĉeestantoj nomis sin la "Orienta Londona Laborista Esp. Grupo" kaj decidis starigi komenc. kurson post pasko. — Okazis ekspozicio esp-a ĉe vesper-lernejo por viroj ĉe Beth. Green. *3398.*

Germanio

Leipzig. En la SAT-kunveno 1. aprilo unuafoje estas debatita la problemo pri unuigo de prol. esp. movado je la bazo de unu sennacieca amas-organizaĵo. La debaton partoprenis la estraro de LEA, kaj la diskutado kompreneble estis tre vigla. Kvankam montriĝis emo solvi la malfacilan problemon, la negativaj tendencoj estis pli fortaj ol la pozitivaj, kaj paŝo antaŭen ne estis farata. Tamen la komencita debato daŭros, kaj sama temo estos pritraktata 15. apr.

Norvegio

Oslo. 3 novaj kursoj por komencantoj, 38 gelernantoj. En *Lilleström* kurso inter bontemplanoj 8 p.

Laborista vivo: Granda minacinta laborkonflikto finiĝis per venko de l' laboristoj. Ili ricevis rekompencon por la plialtigo de l' vivkostoj.

Cetere regas ĉi tie granda senlaboreco. Dum febr. estis en Oslo pli ol 8000 senlaboruloj. En la norvega laborista partio (komunista sendependa) okazis nova malpaco. Studenta grupo "Tagiĝo" kun ĉ. 100 m. estis eksigata el la partio pro nekonsento pri la kontraŭmilitista sintenado de l' partigvidantoj. La efektivaj kaŭzoj de l' oftaj malpacoj estas intrigoj inter personoj kiuj volas esti gvidantoj de l' laborista movado. *102.*

Sovet-Unio

Leningrado. — Loka SAT-Grupo aranĝas ĉiudimanĉajn raportojn en Esp. Ĝis nun okazis: 1. marto raporto de k-do Podkaminer, „Evoluo de la lingvo el vidpunkto marksana", 8. marto — D-ro A. Fiŝer. "Minaco de oksigena malsato", 15. marto — k-do G. Teterin, "SAT-Kooperativo kaj ĝia laboro", 22. marto — k-do Otto Sall, "Kritiko de vidpunkto de Leo Tolstoj pri patriotismo kaj registaro", 29. marto — k-do G. Bransburg, "Pri la hebrea literaturo".

Novaj rondoj estas gvidataj ĉe Naskejo de V. O.-distrikto (D-ro Fiŝer) kaj V. O.-distrikta Klubo (Frank).

Leningrada Gubernia Komitato de Sovetl. Esp. Unuiĝo protektas ĉeneron "Esperanto" ĉe 28 taĉmento de junaj pioniroj.

Komunaj kunvenoj de oficistoj, de Profesiaj Unuiĝoj, de Ligno- kaj Kemilaboristoj akceptis rezoluciojn en kiuj oni opinias necesa enkondukon de Esp. en la lernejojn kaj atentigas la kultur-klerigajn komisionojn pri neceseco disvastigi Esp-on inter membroj de Profesiaj Unuiĝoj.

24. marto okazis raporto en Klubo de Murmana Fervojo (antaŭ 150 pers.), raportis k-do Anatolij, 27. marto en Presejo "Molodaja Gvardija" en komuna kunveno okazis raporto de k-do Karro (antaŭ 140 pers.). Ambaŭloke Esp-rondoj organizataj. *Geo. Teterin.*

Lubni (Ukrainio). Societo de esp-istoj aranĝis raportojn pri esp. ĉe kunveno de junularo en Fervojista Klubo, post kiu fondiĝis studrondeto (40 partopren.), kaj ĉe kunveno de kamparanoj en vilaĝo Zasulje, kion sekvis ankaŭ fondo de grupo.

Ĉe Lubni'a Unuigita Labor. Klubo funkcias du kurs-grupoj (gvid. de gek-doj Farber k. Timofejev).

Aperas artikoloj pri esp. en murgazetoj de laborejoj. Organiziĝis SAT-grupeto.

Skizoj pri nacia kaj kolonia problemo[1])

G. Brojdo

Kia estas la nacia politiko dum la periodo de kapitalismo-formiĝo?

Tiu ĉi periodo ampleksas la tutan historion komencante de la ekestiĝo kaj evoluo de kapitalismo kaj ĝis ĝi atingas sian plej superan stadion — imperialismon. En ĉi unua periodo la burĝaro travivas du diversajn laŭ sia enhavo epokojn, speguliĝantajn ankaŭ en ĝia nacia politiko. En la epoko, kiam formiĝas la kapitalisma mastrumo kaj la burĝaro batalas kontraŭ la feŭdismo, ni havas unu sistemon de la klasaj interrilatoj; en la epoko, kiam la burĝaro regas sur la ruinoj de renversita klaso de bienposedantoj, ni havas aliajn klasajn interrilatojn.

Dum la unua epoko la klasa batalo okazas precipe kontraŭ la bienposedantoj kaj gvidanto ĝia estas la burĝaro, loganta kun si la vastajn amasojn de kamparanaro, de urbaj proletoj kaj de urba eta burĝaro.

Karakterize-tipa por ĉi epoko estas la granda franca revolucio de 1789 j.

Dum la dua epoko ni havas la disvolvitan kapitalisman mastrumon, kunmetiĝintan nacion de la reganta burĝaro, armita per la ŝtata aparato, disvastiganta sian influon ekster la limojn de la kunmetiĝinta nacio aŭ ŝtato. Dum tiu ĉi epoko sur areno de la klasbatalo aperas kiel ĉefaj klasoj — la burĝaro kaj la proletaro.

Tiu ĉi diferenco en la ekonomiko kaj klasaj interrilatoj de la du epokoj respeguliĝas en la tuta politiko de la komandantaj klasoj kaj aparte en ilia nacia politiko.

La nacia politiko de la burĝaro dum la unua epoko estas direktita al kreo de unueca nacio, al la batalo kontraŭ la feŭda disigiteco por unueca ŝtato, por unueca nacia scienco, arto, kiuj devas levi kaj unuigi diversajn klasojn (kamparanoj, metiistoj, et-burĝoj, laboristoj) kontraŭ la feŭdoj-bienposedantoj.

Aliflanke la nacia politiko de la burĝaro estas direktata por ŝirmi la organizatan de ĝi arenon de sia agado (sian merkaton) kontraŭ la konkuranta batalo de la aliaj kunmetiĝintaj aŭ kunmetiĝantaj nacioj.

La unueca potenca armeo, la dogana politiko, direktita al protektado de la "patria" industrio kaj al la batalo kontraŭ la alilanda, la unueca ŝtat-aparato — jena estas la ĝenerala politiko de l' burĝaro dum ĉi periodo. Konforme al tio estis konstruata ankaŭ ĝia nacia politiko: la plena ekonomia kaj politika subigo de malgrandaj popoloj, trafintaj en la cirklon de ĝia agado, la sistemo de jugado, senrajto rilate al tiuj popoloj, kiuj rezistis al ĉi politiko.

Dum la dua epoko la nacia politiko de l' burĝaro perdas tiun progresigan elementon, kiu estis ligita kun la organizo de nacio.

Samtempe ĝia nacia politiko kompliktiĝas per tiu fakto, ke sur la areno de la klasbatalo aperas proletaro kun siaj organizaĵoj.

Ŝanĝiĝo de la klasaj interrilatoj venigas al tio, ke la nacia problemo transformiĝas en klasbatalan armilon de l' burĝaro kontraŭ la proletaro. La nacia problemo estas utiligata kun la celo nebuligi la klasajn kontraŭdirojn. "Nacio", "patrio" postulas militon, konkiran politikon, defendon kontraŭ malamiko, kaj la burĝaro plifortigas sian laboron super la kreado de tiu "nacia spirito", kiu ebligos al ĝi ĉerpi necesamomente kanonan viandon el vicoj de la proletaro kaj estingi la flamon de l' klasa batalo.

Per plifortigo de nacia malamikeco la burĝaro gvidas politikon de la disigado de proletoj diversnaciaj kaj diverslandaj. Per helpo de la politiko, favoranta iujn naciojn kaj juganta la aliajn, ĝi instigas unu nacion kontraŭ la alian kaj tiuvoje ĝi organizas sian regadon super kelkaj nacioj, enpremitaj en la kadrojn de unu ŝtato. Fine, dum tiu ĉi dua epoko, kune kun la disvastiĝo de kapital-agado ekster la limojn de la organizita de ĝi ŝtato, la burĝaro vastigas sian sistemon de naciisma subigo, jugado kaj sklavigado ekster la limojn de la organizita de ĝi nacio kaj ŝtato. Aperas kaj disvolviĝas tiel nomata kolonia ĝia politiko, kiu estas nova formo en la efektivigo de klasaj interesoj de la burĝaro ekster la limoj de ĝia nacio kaj ŝtato. (Daŭrigota) Trad. P. Jakovlev

1) Vidu n-rojn 22—26.

Minsk. Ĉe Okrpolitprosvet (regiona administrejo de politike-kleriga laboro) estas organizitaj kursoj de Esp-o. Funkcias du grupoj kun 40 partoprenantoj en ĉiu.

Moskvo. 18. marto niaj k-doj faris en Esp-o raporton pri I. R. H. dum la publika kunveno de komunista kolektivo ĉe Moskva Centra Telegrafo. Estas akceptita rezolucio pri utiligo de Esp-o por interligiĝo kaj helpo al alilandaj politikaj enkarcerigitoj.

Pskov. En Klubo de sovetoficista sindikato k-do Petrov faris 8. febr. raporton pri la temo: "Esperanto — internacia lingvo de revolucia proletaro; ĉeestis 200 k-doj. La raporto kaj organizita dum ĝi ekspozicio de esp-a literaturo rezultigis kurson kun 58 partoprenantoj.

Tuapse (Kaŭkazo). Dum februaro en fervoja lernejo estis fondita rondeto de esp. lernantoj, sub gvidado de k-do Belakov.

Rondeto konsistas el 25 gelernantoj, geknaboj kaj gejunuloj.

Dum festo de Pariza Komuno (18 marto) la nomita rondeto aperigis la unuan numeron de murgazeto "Renesanco".

En gazeto skribas nur lernantoj, sciantaj nur tri lecionojn el lernolibro de Kar kaj Panje, kaj kun helpo de vortaro de Saĥarov. Dum nuntempo rondeto lernadas la historion de internacia lingvo. *3935.*

Urečje (Sluck. okr.). Esperanto estas enkondukita laŭ decido de lerneja soveto, aprobita de regiona Klerig-Fako, en loka sepjara lernejo kiel fakultativa objekto. Por aĉeto de lernolibroj la lerneja soveto asignis necesan monsumon.

Korekto. Sub "Kroniko" en S. n-o 23 mi ellasis en mia raporto la vorton "Esperanta". Legu: "Fondiĝis Nord-Amerika Esperanta Laborista Asocio." *G. S.*

Pri Esperanta laboro en Blankrusio — Sovet-Unio —

Baldaŭ nia C. Oficejo de Blankrusa Federacio Sovetlanda Esp-ista Unuiĝo festas sian dujaran jubileon. En tago de festo estos malfermo de Tutblankrusa Kongreso Esp-ista.

Ĝis tiu kongreso en distriktoj estos organizitaj esperantaj vesperoj.

Nun C. O. havas Regnajn kursojn de Esp-o ĉe Minska Distrikta Fako de Popolklerigado. Funkcias 2 grupoj. Baldaŭ komencos labori tria. Ĉe fako estas starigita speciala esp-a fondo. En soveto de kursoj eniras reprezentantoj de lernantoj, instruistoj, fako al P. K. (Okrono) kaj COBFSEU. Prezidanto de soveto kaj gvidanto de kursoj estas k-do Judin; distrikta k-to en Minsk kiu unuigas ĉelojn ĉe limimpostejo (30), ĉe klubo de komunista junularo (50), universitato (80), Pola pedagogia Teknikumo (80), ĉe N. limimposttaĉmento, en vilaĝo Abĉak kaj Smiloviĉi. Reprezentantoj en Kustovirici-vilaĝo, estas jam 3 espistoj. Pustoŝka, Psigosovo, Ĵlobin (kursoj el 30 p.), Vitebsk (3 kursoj el 120 p.), Bobrujsk (3 kursoj el 75 p.).

Ĉe C. O. laboras: 1. Blankrusa Esp-o Gazet-Informa Oficejo, kiu liveras al blankrusaj gazetoj artikolojn tradukitajn el esp-aj gazetoj. Jam estas presitaj preskaŭ 500 artikoletoj pri Esp-o en tagaj gazetoj "Zvezda" (Stelo) "Sovetskaja Bjelorusj", "Mlot" (Martelo) kaj aliaj.

El tiu nombro preskaŭ 150 pri SAT.

2. Agentejo "Espo" kiu liveras literaturon kaj lernolibron. Estas disvastigitaj 1000 lernolibroj, 300 vortaroj kaj 200 vol. alia esp-a literaturo.

3. Instruktora Sekcio, kiu nun laboras por organizo en Blankrusio de Centraj Instruktoraj-Pedagogiaj Kursoj Esp-aj.

4. Sovetlanda Esp-ista Servo.

C. O. eldonas ĉiumonate informbultenon kiel ligilo kun lokoj.

En Borisov ni havas novan plenrajtigiton. En aprilo okazos Minska Distrikta Konferenco de Esp-istoj. En Minsko laboras SAT-ĉeleto el 42 personoj. Sekretario de SAT-ĉeleto — *D. Snejko.* *D. S.*

Alvoko

Leningrada Gub. Komitato de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo organizas migrantan ekspozicion en laboristaj kluboj por propagando de internacia lingvo Esperanto kaj organizado en ili de Esp. rondoj. Por la organizo de la ekspozicio estas komisiitaj tri k-doj: k-dino Bregman, k-do Sall kaj k-do Zlotar. La komisiono jam komencis sian laboron, sed havante tre malriĉan materialon en la Gub. Komitata Biblioteko kaj dezirante plej larĝe kaj organizite ĉirkaŭpreni larĝajn laboristajn amasojn per lernado de Esperanto, la ekspozicia komisiono sin turnas al ĉiuj kamaradoj kun serioza peto: sendu plej diversajn esperantaĵojn al la ekspozicia komitato (literaturaĵojn, sciencajn kaj propagandajn librojn, jurnalojn, revuojn ktp.) al Leningrada Komitato de SEU. La materialo estos eluzita por la ekspozicio kaj laŭdezire estos post ĝia likvido resendita.

K-doj! Ne flankiĝu de ĝenerala partopreno en la laboro. Ne forgesu, ke en la kolektiva laboro estas garantio de nia venko.

Adreso por la sendaĵoj: Leningrada Gubern. Komitato de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (por ekspozicio), Pleĥanov-str. 2, Leningrado, Sovet-Rusio.

R E C E N Z E J O

Gazetoj

Represis artikolojn el S.: *Revue des Primaires*, Marseille, n-ro 1, Virinoj en Turk. (S. 1), *Le Travail*, Verviers, 13. 2. Financa krizo en Rum. (S. 13), 16. 3. Dana kapital. (S. 22), 20. 2., Mongolio (S. 15), *Le Liberé*, Nice, 15. 2., Fin. krizo en Rum. (S. 13), Let. el Finnl. (S. 10), Laborkonfl. en Svedio (S. 4). *Znamja Pionera* (Standardo de Pioniro), Blagoveŝĉensk s. A, 2. 3. N. 15, Infanl. en Ĉinio (S. 9). *L' Humanité*, Paris, 2. 4., Let. el Rumanio (S. 19).

Div. notojn enpresis: Schles. Arbeiter-Zeitung, Breslau, 31. 3.; Geistesfreiheit, Bochum, marto.

KORESPONDADO

TARIFO

Korespondado: Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.aĵo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas **la devon, nepre respondi** almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Bulgario:

— K-do *Georgi Petkov*, str. Struma 7, *Plovdiv*, dez. koresp. k. ĉ. l., precipe kun maristoj. Ĉiam resp.

Francio:

— K-do *Paul Dauchez*, 46, Grossaŭ, *Strasbourg-Neudorf*, dez. koresp. PI, PM, k. ĉ. l.

Germanio:

— K-do *Hermann Uschner*, Herbststr. 19, *Dresden-N. 30*, dez. koresp. pri ĉiuj temoj, interŝ. L, PI, PM, bfl, esp.-gaz.

— K-do *Alfons Beinlich*, Erlenstr. 20, *Dresden-N.*, dez. koresp. pri filozofio, politiko, arto k. a. temoj, interŝ. PI, PM, bfl.

— K-do *Herbert Rücker, Prittwitzdorf*, Kr. Bolkenhain i. Schles. dez. koresp. L, PI, k.ĉ.l.

— K-do *Paul Scharf, Prittwitzdorf*, Kr. Bolkenhain i. Schl. L, PI, k. ĉ. l.

— K-do *Alfred Scharf, Rudelstadt*, n-ro 48, I. Schles. (SAT-ano 4028) L, PI, bfl, k. ĉ. l.

— K-do *Karl Bretzel*, Hasenbergstraße 72, *Stuttgart*, pri ĉiuj lab. temoj, L, PK, PI, bfl, k. ĉ. l.

Sovet-Unio:

— "*Juna Proletario*", ĉiutaga gazeto de laborista junularo, organo de Kieva Gubkomo de komjunularo, deziras korespondi kun komunistaj kaj laboristaj organizaĵoj. Adr. *Kievo*, Vorovskaja 30, 42, redakcio de "Molodoj proletarij", Internacionalnij otgel.

— K-do *Dunin M. S.*, ul. Gercena 14 A, kv. 21, *Moskvo*, pri natursciencoj, speciale pri botaniko, mikrobiologio, mikologio kaj fitopatologio. Tre bezonas ricevi specimenojn de plantoj.

— K-do *Volohov Anatolo*, mekanika teknikisto, Kambarova str. 48, *Tambov*, pri aktualaĵoj kaj vivkutimoj k. ĉ. l. P. I.

— K-do *Koblov Kesarj*, 3805, petas ĉion por li, de nun sendi laŭ jena nova adreso: USSR., Uzbekistan, *Taŝkent*, poĉtovij jaŝĉik (poŝtkesto) n-ro 6.

— K-do *Hudobin Bazilo*, ul. Gogola 49, *Serdobsk*, Sarat. gub., k. ĉ. l. ĉiam resp.

— *Esperantista grupo* serĉas korespondantojn en la tuta mondo. Adresu: K-do *Prohorĉik Petro*, Novo-Romanovskij per 11, kv. 2, *Minsk.*

— K-dino *A. Jakovleva*, atentigas, ke ŝia adreso de nun estas: Poŝtkesto 667, *Moskvo*, kaj komunikas al siaj koresp-antoj, ke nun post resaniĝo ŝi resp. al ili ĉiuj.

— K-dino *Larĉenko E. P.*, 1-a Graĵdanskaja, 11, *Moskvo*, pri instruado de manlaboro al blinduloj. Ĉiam respondas.

— K-dino *Klimova M. A.*, Mal. Bronnaja, 15, kv. 41, *Moskvo*, pri edukado de blinduloj. Ĉiam akurate respondas.

— K-do *Kuzin Bazilo*, Narkomzem Uzb. SSR, *Taŝkent*, pri div. temoj k. ĉ. l. L, PI, bfl.

— K-do *Miŝkin Georgo*, Rjadovskaja, 21, *Taŝkent*, pri divers. temoj k. ĉ. l. L, PI, bfl, Preferas bildojn pri popolmoroj, kutimoj, vestoj, tipoj ktp.

SAMARA ESPERANTISTA GRUPO

ĉe FERVOJISTA KLUBO je nomo de MASLENNIKOV

(Samara, Volgio, Sovet-Rusio)

serĉas korespondantojn en ĉiuj partoj de l' mondo pri ĉiuj temoj de laborista movado. Havas sekciojn: fervojistan, poŝt-telegrafistan, junulan k. a.

Adresu al grupgvidanto:

P. E. ASTAFJEV, Krestjanskaja 100, Samara, Sovet-Unio.

POŜT-TELEGRAFISTA SEKCIO DE SAMARA ESP. GRUPO

deziras korespondi

kun samfakaj grupoj kaj unuopaj kamaradoj pri ĉiuj temoj de la profesia movado k. ĉ. l.

Adresu: **Iv. Fedotov,** Ĉefa Telegrafo, **Samara, Sovet-Unio.**

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG